

altaĵo en la mezo de la vizaĝo, la vorto „*verheffend*”<sup>13</sup>) devus certe signifi altaĵon. Kun mia propono ĉiuj konsentis. Supozu, kiel nepriskribeble granda estis tiam mia ĝojo! Tiamaniere progresis iom post iom nia tasko, kvankam tre malrapide. Ĉiufoje kiam ni renkontis nekompreneblan vorton, *Zinnen* (sentoj) ekzemple, ni markis ĝin per kruco en ringo kun espero, ke ni iam povos klarigi ĝian signifon, kaj nomis ĉion nekompreneblan „*Kucuŭa-kruco*” (ĉar la marko similas al *kucuŭa*, enbuŝaĵo de la ĉevalo), kaj ĉiufoje kiam ni renkontis tian vorton, ni kun ĉagreno diris: Ho, denove *kucuŭa-kruco*!

Ne mensogas nin la proverbo: Homo projektas, Dio direktas. Kaj tiamaniere ni klopodis kaj klopodis; 6-7 fojojn ĉiumonate ni kunsidis kaj paciencie daŭrigis nian taskon. Kaj post unu jaro nia vortotrezoro fariĝis pli riĉa, kaj ni povis traduki 10 liniojn aŭ pli ĉiutage sen speciala penado. Aliflanke ni ankaŭ petis konsilojn de interpretistoj, kiuj ĉiujare en printempo vizitis *Edon*. Intertempe ni ankaŭ kelkafoje ĉeestis la dissekcadon kaj krome dissekis mem diversajn bestojn por kompletigi nian komprenon. (Kaj tiamaniere fariĝis fine la manuskripto de *Kaitai-Sinŝo* (nova libro de la anatomio) eldonita 1774.)

\*\*  
\*

La Redaktoro dankas s-ron R. L o r e n t z, bibliotekiston de *Teyler's Stichting* en Haarlem pro kelkaj valoraj informoj.

930.85(52) : 611

## UNUAJ DISSEKCAĴOJ EN JAPANUJO

### Pri Zôŝi kaj Kaibô-Zuŝi

Prof. D-ro S. NISHI

Maebaŝi, Japanujo

#### Antaŭrimarko.

*Zôŝi* signifas laŭlitere splanknologion aŭ priskribon pri la visceroj. Ĝi estas verko neignorende grava en la medicina literaturo de Japanujo kaj konsistas el 82 folioj dividitaj en 2 volumojn. La ĉapitro, kiu pritraktas la dissekcadon, oficiale unue permesitan en 1756, ampleksas tamen nur 6 foliojn, krom 2 folioj por ilustraĵoj kaj 1 por postskribo, dum la cetera, multe pli ampleksa parto de la verko estas dediĉita al antaŭparoloj de kelkaj kolegoj de la verkinto kaj aldonoj de alispecaj enhavoj. La verkinto, J a m a ŭ a k i - T ô j ô, nomita ankaŭ Ŝ ô t o k u

(1705-'62), estas unu el la plej eminentaj medicinistoj de tiuj tagoj; dum la studado kaj praktikado li estis ĉiam afliktata pro la malkredo al la doktrinoj en la ĉina medicino, kiu havis tiam la absolutan aŭtoritaton en la rondo de niaj kuracistoj. Kaj tamen li volis konstati la absurdecon en la ĉina anatomio per sia propra okulo. Kvankam li ankoraŭ ne povis tute liberigi sin de multaj antaŭjuĝoj, kvankam lia observado ĉe la dissekcado estis tre kruda, eĉ kun kelke da gravaj eraroj, kaj kvankam lia pensmaniero estis krome ne ĉiam logika, ni povas spite de ĉio klare rimarki en li burĝonon de la moderna sciencista spirito, kiu kredas nur tion, kio estas observita, kaj en tiu ĉi senco ni povas senhezite nomi lin la unua natursciencisto en Japanujo.

Kvar jarojn post la dissekcado de T ô j ô en Kioto, la dua estis farita en 1758 de K u r i j a m a - K ô a n, disĉiplo de T ô j ô en Hagi, malgranda urbo en Gubernio Jamaguĉi. La postan jaron, en 1759, li havis plue ŝancon dissekci virinan kadavron, la unuan en Japanujo. La saman jaron li skribis verketon nomatan *Kaibô-Zuŝi* (anatomia atlaso), en kiu li faris raportojn pri la supre menciitaj dissekcadoj en formo de letero adresita al sia majstro. Kiel grandaj malfacilaĵoj prezentigis antaŭ la pioniroj de la moderna medicino en tiuj tagoj, tion oni povas bone imagi studante ambaŭ ĉi tiujn verkojn.

En mia nuna tasko mi petis helpojn al D-roj T. O g a ŭ a, profesoro de anatomio en Ŝtata Tokio-Universitato kaj R. Ô t o r i, profesoro de medicina historio en Keiô-Universitato; pri malfacile kompreneblaj esprimoj en la originalaĵoj, kiuj estis skribitaj, kiel tiam kutime, en la ĉina klasika stilo, mi konsultis ankaŭ D-ron K. N a k a z a w a, profesoro de ĉina literaturo en nia universitato; al tiuj ĉi tri sinjoroj mi ĉi tie esprimas mian sinceran dankon.

### 1. El Zôŝi.

(Libera traduko de la koncerna ĉapitro.)

En la antikva medicino *Somon*<sup>1)</sup> okupis la plej altan lokon, kaj al ĝi sekvis *Reisû*<sup>1)</sup> kaj *Nankjô*<sup>2)</sup>. En ili oni trovas tre detalan priskribon pri 5 *Zô*-oj kaj 6 *Hu*-oj<sup>3)</sup>, pri iliaj regionaj kaj funkciaj rilatoj, pri iliaj rilatoj al 5 elementoj<sup>4)</sup> kaj 5 koloroj<sup>5)</sup>, pri 3 partoj kaj 9 signoj<sup>6)</sup>, pri la aranĝoj de angioj kaj nervoj<sup>7)</sup>, ktp. De post *Gi*- kaj *Ŝin*-dinastioj (en la 3a jarcento p. K.) oni kun alta estimo rigardis ilin kiel solajn fontojn de nia okupo, kaj neniu esprimis kontraŭan opinion. Mi, Ŝ ô t o k u, kvankam neklera<sup>8)</sup>, studante la medicinon jam de mia juneco, kaj estante nun kortega internisto, mi ofte renkontis diversajn demandojn dum mia praktikado. Ĉiufoje mi tiam petis konsilon de miaj antaŭuloj, demandis ankaŭ erudiciulojn kaj klerulojn, kaj tiamaniere pasis multaj jaroj. Unu tagon mi vizitis mian majstron G o t ô - J ô a n (1659-1733)



hejme kaj havis diskuton pri la visceroj. Li diris: Restus al ni fine nenio alia, ol ke ni dissekcu (homan kadavron) kaj observu. Ĉar ni tamen ne povas malobei, kion la aŭtoritato al ni malpermesas, ni devas por la nuna tempo esti kontentaj per la lutro. Kiom mi estis informita, ĝiaj visceroj similas al la homaj; mi ankaŭ ofte dissekcis ĝin kaj povis certigi, ke oni ne trompis min. „Unu sperto valoras pli ol cent informoj!” oni diras. Vi ankaŭ provu! Mi do obeis al lia konsilo kaj dissekcis lutron: Jen la pulmoj, jen la koro, jen la hepato kun la galveziko, jen la renoj, jen la lieno kaj la stomako, jen la urinveziko kaj la intesto! Tiamaniere mi povis distinge konstati la ekziston de la nomitaj 9 organoj. Iliaj taskoj estas bone diveneblaj, iliaj funkciadoj imageblaj. Vere, kion la eminentulo certigis, neniun povus ja nei. Mi tamen nur miris, kial mi ne povis eltrovi la t. n. maldikan inteston<sup>9)</sup>. Malgraŭ plurfoja dissekcado (de lutro) mi ne trovis respondon al mia demando. ....<sup>10)</sup> Inter ĉiuj supre nomitaj libroj publikigitaj antaŭ la Epoko de Internaj Militoj (de la 5a ĝis la 3a jarcento a. K.) oni do ne trovas eĉ unu, kiu mencias la 11 organojn, aŭ kiu apartigas la inteston en dikan kaj maldikan. Ĉ ŭ k e i<sup>11)</sup> ankaŭ nur skribas: La manĝaĵo amasiĝas en la stomako, la urino en la urinveziko, kaj la fekaĵo en la intesto. Sensencaj diskutadoj furorintaj dum la *Ŝin*-Dinastio (de la 3a ĝis la 5a jarcento p. K.) havis tiamaniere malbonan influon sur la posteulojn, kiuj nur senkritike ripetadis, kion ili legis en *Somon* kaj *Nankjō*<sup>1,2)</sup>. Ili alte taksis nur la nomojn kaj perdis la esencon. Tia tendenco plivastiĝis, kaj la ĝusta vojo perdiĝis; kaj la posteuloj devis nur ŝanceliĝi tien kaj ĉi tien kvazaŭ ondoj en ventoj. Ĉagreno netolerebla! Responde al mia plendo oni konsole diris: Vi estas prava. Ĉu ne diris antikvuloj: „Kiu posedas kornojn, ne posedas ungegojn; kiu flugilojn, ne manojn. La homo kaj la besto ne estas samspecaj; kiel iliaj organoj povas esti samformaj?”<sup>12)</sup> Mi devis silenti, kaj de tiam pasis al mi 15 jaroj de malĝojo kaj malgajo.

Estis la 7-a de la 2-a supermonato en la jaro de *Kinoe-Inu*<sup>13)</sup> de *Hōreki* (1754); 5 kondamnitaj estis ekzekutitaj en la orienta apudurbo de Kioto. La prefekto de Kioto<sup>14)</sup> estis tiam *S a k a i - T a d a m o ĉ i*, feŭdestro en *Ŭakasa* (Gubernio Hukui); liaj kortegaj kuracistoj *H a r a - S ō a n*, *I t ō - T o m o n o b u* kaj *K o s u g i - G e n t e k i* estas ĉiuj miaj kolegoj. Ni do petis la aŭtoritaton por liveri al ni kadavron de unu ekzekutito<sup>15)</sup>, por ke ni povu dissekci ĝin en la malliberejo, kie mi la unuan fojon povis partopreni la dissekcadon. Oni metis la kadavron sur maton antaŭ la oficejo kaj igis la ekzekutiston<sup>16)</sup> dissekci ĝin. Unue la brusto estis senhaŭtigita. Jen ekaperas *Ĉokkocu* (sternumo) sceptrosimila, kiu streĉas sin de *Tentocu* (jugulara foso) ĝis la diafragmo. La ripoj, ĉiuflanke 9, aspektas kvazaŭ lignaj ripoj de konstruaĵo. Due oni transverse tratranĉas la interripajn membranojn kaj

vertikale la ripojn, kiuj estas ligitaj kun la sternumo. Oni plue kondukas la tranĉilon inter ostoj kaj karnoj, kvazaŭ tra ŝlimo kaj distranĉas ambaŭflanke la ripojn, por forpreni la sternumon. La regiono super la diafragmo estas nun vaste videbla: La traĥeo staras antaŭe; la ezofago kaŝas sin malantaŭe; ambaŭ pulmoj kuniĝas supre kun la traĥeo, kaj atingas malsupre la diafragmon; ili havas la koron inter si kaj aspektas kvazaŭ 2 sakoĵoj el purpura brokato; la dekstra pulmo posedas 2 fendojn kaj la maldekstra nur unu. Se oni blovas la traĥeon per tubo, ambaŭ pulmoj egale ŝvelas kaj freŝe brilas kiel flugiloj de cikado. La koro pendas inter ambaŭ pulmoj kaj similas al burĝono de ruĝa lotusfloro; ĝi kuniĝas supre kun la traĥeo(!), turnas sin malsupren kontraŭ la diafragmon; la tuboj (sangangioj) dekstra kaj maldekstra apartenas al ambaŭ pulmoj, la tria (malsupra kavvejno) traboras la diafragmon, por sendi aeron (!) al la hepato. La diafragmo kuŝas sub la koro kaj disigas la malsupran (abdomenan) regionon de la supra (brusta). La hepato troviĝas dekstraflanke, malhele purpura, kun unu faldo. La galveziko algluiĝas al la dorsa supraĵo de la hepato, bluece blanka kaj elipsoforma kiel ovo. La stomako kuŝas sub la diafragmo; ĝi ricevas supre la ezofagon kaj kuŝas sur la intesto. La lieno troviĝas maldekstraflanke malantaŭ la stomako, kun formo de ĉevala hufo kaj kun krepsimila supraĵo. La intesto<sup>17)</sup> kuŝas sub la stomako kaj kuras malsupren al la anuso; ĝi estas blankece rozkolora, volviĝas komplikite, kaj estas 4 ĵo-ojn (ĉ. 12 metrojn!) longa. La renoj troviĝas sub la stomako malantaŭ la intesto kaj estas ovoformaj, kun koloro hele purpura. Ĉiu el ili elsendas tubon (ureteron), kiu kondukas malsupren rekte al la spermatubo<sup>18)</sup>. Ili estas envolvitaj en blanka graso kaj estas sekve observeblaj post forpreno de la graso. La urinveziko, supre kunigita kun la intesto<sup>19)</sup>, kuŝas malantaŭ la pubosto. Premate, ĝi eligas urinon. La koro, pulmoj, hepato, lieno kaj renoj estas ĉiuj karnecaj, kaj la stomako, galveziko, urinveziko kaj intesto membranecaj. Kie la nomitaj 9 organoj<sup>20)</sup> kuniĝas unu kun alia, tie troviĝas malantaŭ ili blanka kaj flava grasmasso, kiuj envolas ilin, kvazaŭ nebulo maldense kovras arbarojn kaj valojn. La vertebraro posedas ĉe sia dorsa supraĵo vicon de elstaraĵoj similan al la dorsa naĝilo de fiŝo; ĝi konsistas el 17 segmentoj<sup>21)</sup>, supraĵ malgrandaj, ju pli malsupraĵ des pli grandaj, kaj similas al juna bambuplanto<sup>22)</sup>. Kiam oni forprenas la internaĵojn kaj rigardas ĝin de interne, oni povas distinge kalkuli la nombron de ĝiaj segmentoj.

En la mano troviĝas multege da tendenoj, kiuj rekte iras en la antaŭbrakon. En la mandorso ili atingas unufanke la 5 fingrojn, transiras aliflanke antaŭ la kubuto en karnon. La kubuto estas nur kovrita de haŭto, posedas nek tendenojn, nek angiojn, kiuj atingus la ŝultron aŭ



la dorson (?). Same ankaŭ ĉe la genuo kaj la kruro. La priskribo en *Somon* kaj *Nankjō*<sup>1,2)</sup> pri la longeco de la ostoj, pri 21 segmentoj (de la vertebraro), pri la tendenoj kaj angioj en la mano kaj la piedo estas evidente eraraj, same ankaŭ tiu pri la 3 partoj<sup>6)</sup> kaj iliaj rilatoj al la visceroj. La priskriboj, ke la pulmoj konsistas el 6 lobo kaj 2 aŭrikloj, ke la koro posedas sakon, la hepato 4 dekstrajn kaj 3 maldekstrajn lobojn, la intesto 16 volvaĵojn, ktp. devenis sendube de miskomprenoj<sup>23)</sup>. Kiel bone koincidas tamen aliflanke la priskriboj kun la observadoj ĉe la lutro? Ĉu ili devenis de la scioj pri la visceroj de bestoj, aŭ ĉu de arbitra supozo? Mi iam havis ŝancon foliumi libron de anatomio verkitan de iu barbaro<sup>24)</sup>; tute konfuzite mi tiam povis kompreni nenion; foliumante ĝin denove mi nun bone komprenas. Ĉuj organoj en la brusto kaj la dorso (!) estis tute similaj al tiuj desegnitaj en la libro. Vere mirinde, ke la faktoj rekte observitaj bone koincidas unu kun la alia eĉ trans tiel granda distanco (inter Oriento kaj Okcidento). ..... En la antikva tempo la kuracprincipo estis ekzakta kaj la kuracmetodo mistera, kaj nur sanktuloj kaj saĝuloj povis iniciati ilin. La ĉarlatanoj en *Ŝin-* kaj *Kan-*Dinastioj (de la 3a ĝis la 1a jarcento a. K.) nur kolektis la vortojn de antikvaj eminentuloj, almiksis al ili popolajn superstiĉojn, kripligis ilin per falsaj rezonoj, kaj intencis tiamaniere akiri la konfidon de la popolo per la nomoj de *Kōtēi* kaj *Gihaku*<sup>1)</sup>. Tio estus ja komparebla al fuŝa pentraĵo de tigro, kiu aspektas kvazaŭ hundo (kato?)<sup>25)</sup>. Tiamaniere ili tamen ne povus trompi intelektulojn. Ili konjektas per sia kripligita spirito la spiriton de la sanktuloj kaj saĝuloj, sed tio nur pruvus ilian malsuperan kapablecon. Plue, la posteuloj ne volis studi antikvajn verkojn nek praktiki modernajn teknikojn; ili nur klopodis posedi la riĉon de *Kiton*<sup>26)</sup> kaj akiri la famon de *Joran*<sup>27)</sup> kaj sciis nur flati al la publiko. ..... La sagfero jam profunde trapenetris la spacon inter koro kaj diafragmo<sup>28)</sup>, kaj tiamaniere pasis 14 jarcentoj. Kiel longe! Kiel bedaŭrinde! Kion unu opinias prava, tion alia opinias malprava, kaj kion unu malprava, tion alia prava; tio eble estas la kaŭzo, kial la opinioj de la aŭtoroj ne koincidas. Hipotezo estas renversebla, fakto tamen neniam. Eĉ saĝulo povas fari eraron, se li pli alte taksas hipotezon ol fakton; sed eĉ ordinarulo povas sin pravigi, se li starigas sian opinion nur sur fakto. La samon oni povus diri pri la visceroj de *Gjō*<sup>29)</sup>, tiuj de *Kecu*<sup>30)</sup> kaj tiuj de barbaroj<sup>24)</sup>. La pino estas denaske pino, la kverko - kverko; bestoj kiuj flugas - flugas, kiuj kuras - kuras. Tio estas la vero neŝanĝebla valida por ĉiam kaj tra la mondo. Tio estas evidenta. Ili tamen ankoraŭ ne konvinkiĝas; ili malestimas eksperimentojn kaj opinias la studon de antikvaj verkoj malmoderna. Kompatinduloj! Kia feliĉo aliflanke, ke mi, vivante bonŝance en la kultura tempo<sup>31)</sup> povas studi antikvajn verkojn kaj praktiki samtempe modernajn procedojn. Mi do ĉi tie priskribas kion mi spertis, kaj esprimas kion mi opinias.

En la 2-a supermonato, *Kinoe-Inu*<sup>13)</sup> (1754).

## 2. El Kaibō-Zuŝi.

(Resumo).

Per lia unua dissekcado farita en 1758 je la kadavro de ekzekutita rabisto, *Kiĉiemon*, la aŭtoro (*Kurijama-Kōan*) povis entute konfirmi la priskribon de *Tōjō*, kun sola escepto de la koloro de la pulmoj, kiun li konsideris kiel individue diferencajn. Li krome ektrovis en la kolo paron da maldikaj tuboj, kiuj laŭ lia priskribo ŝajnas esti la karotidaj arterioj. Li devis tamen interrompi la dissekadon pro subita pluvego akompanata de fulmotondro.

La dua dissekcado estis farita je 16-jara farmistino, *Omine*, kiu estis kondamnita je krucumo<sup>32)</sup> pro adulto kaj murdatenco je sia edzo. La aŭtoro kun siaj kolegoj petis al la aŭtoritato ŝian senkapigon, por ke ili povu utiligi ŝian kadavron por la dissekcado. La ekzekuto estis farita la 21-an de junio (1759) en la suda apudurbo de Hagi. Ĉirkaŭ 100 kuracistoj kaj medicinlernantoj ĉeestis la dissekadon. La ekzekutisto<sup>16)</sup> amputis unue la manojn: blanka karno entenis kelke da maldikaj tuboj, kiuj eble kondukas lakton. Senhaŭtigo de la brusto: La ripoj, sternumo, traĥeo, ezofago kaj pulmoj ne diferencis de tiuj de la viro. Senhaŭtigo de la ventro: la stomako, intesto, hepato, galveziko, lieno, renoj kaj urinveziko ankaŭ egalas al tiuj de la viro. ..... La galveziko ellasis ĉe entranĉo verde-bluan sukcon. Laŭ la klarigo de la dissekciisto la galo gustas tre amara; la sekigita galveziko similas al tiu de urso<sup>33)</sup> kaj bone efikas kontraŭ kardiospaso (?). Li iam posedis ĉirkaŭ 30 pecojn<sup>34)</sup>, nun nur ĉirkaŭ 10, ĉar la ceteraj estis forŝtelitaj de vulpoj, kiuj tre ŝatas ĝin. Poste ankaŭ la aŭtoro provis ĝin kontraŭ la malsano, sed sen ia efiko. .... Malantaŭ la urinveziko troviĝis organo bufoforma, ĉirkaŭ 4 colojn longa kaj 3 colojn larĝa, flave-ruĝa, kun flankaj alpendaĵoj: La maldekstra kun 3 branĉetoj kaj la dekstra kun 2. Ĝi komuniĝis supre per 2 tuboj kun ambaŭ renoj (!); malsupre ĝi malfermiĝis en la vulvon. Ĝi estis do certe la utero; ĝia interna supraĵo aspektis kvazaŭ cikatro, kaj estis ŝmirita de blanka muko. Oni nun eltranĉis la 9 organojn: La koro estis ne tiel freŝ-kolora kiel la vira kaj enhavis interne densan reton de blankaj fadenoj. La renoj entenis en si, same kiel la utero, blankan mukon. .... En la vertebraro troviĝis ŝnurforma organo (spina medolo), kiu kuniĝis supre kun la cerbo kaj (per nervoj) kun ambaŭ brakoj, meze kun ambaŭ renoj (!) kaj malsupre kun ambaŭ gamboj. .... La vertebraro similas al *ŝakuhaĉi*<sup>35)</sup> kaj konsistas el 21 segmentoj inkluzive de 4 sakraj, kiuj ĉe la viro formis unu solan oston<sup>36)</sup>. .... Fine oni malfermis la inteston kaj stomakon. En la stomako troviĝis manĝaĵo kaj akvo, kaj en la intesto ĉirkaŭ centoj da



vermoj (askarido) de diversa grandeco. .... Sub la stomako kaj ekster la intesto troviĝis amaso, flave-ruĝa, pugnogranda, kun supraĵo kun dis-semitaj punktoj kvazaŭ per moksoj kaŭterizitaj, kaj kun dekelke da truoj. Ĝi algluiĝis malfacile disigeble al la intesta membrano (peritoneo?). La aŭtoro sin demandis, ĉu tio eble estas la maso de puso kaj sango priskribita de *Son-Ŝi-Baku*<sup>37</sup>). Al lia demando la dissekciisto tamen respondis, ke ŝi estis tute sana, sed ne havis monataĵojn de post aprilo<sup>38</sup>). .... *Den-Eisen*, kirurgo el Nagasaki, ĉeestis ankaŭ la dissekcadon; li, malkontenta pro mallerta tekniko de la dissekciisto, prenis la tranĉilon de li for, kaj daŭrigis la taskon kun granda lerteco<sup>39</sup>). .... Fine la aŭtoro atentis paron de tendenoj<sup>40</sup>), kiuj etendiĝas laŭlonge de la vertebraro, kaj kiujn li ne rimarkis ĉe la vira kadavro. „Ĉu mi tiam malatente preterlasis ilin ĉe la viro, aŭ ĉu ili estas troveblaj nur ĉe la virino? La decidon mi volas rezervi por estonteco.” Li tiel skribas, kaj finas la leteron per kelkaj pluaĵoj pri privataj aferoj.

### Klarigoj.

(Ĉinaj elparoladoj en parentezo).

1) *Somon* (Su-uen) kaj *Reisŭ* (Ling-ŝu) faras 2 partojn de *Naikjô* (Nej-ĉing), libro de la interna medicino, verkita laŭ onidiro de *Kôtei* (Huang-ti), sankta imperiestro, kaj *Gihaku* (Ĉi-pe), eminenta medicinisto en la ĉina pratempo (la 27-a jarcento a. K.). Oni tamen kredas, ke la verko estiĝis malpli frue, dum *Kan* (Han)-Dinastio (de la 2-a jarcento a. K. ĝis la 2-a jarcento p. K.).

2) *Nankjô* (Nan-ĉing), libro de la akupunkturo, verkita de *Sin-ecuĵin* (Ĉin-Jueh-Jen), dum *Ŝu* (Ĉou)-dinastio (7-a jarcento a. K.).

3) En la antikva medicino oni konis 11 viscerojn: - 5 *Zô*'oj aŭ parenkimecaj organoj: Koro, pulmoj, hepato, lieno kaj renoj, kaj 6 *Hu*'oj aŭ membranecaj organoj: Stomako, dika kaj maldika intestoj, galveziko, urinveziko kaj *Sanŝo*. La naturo de la laste nomita organo ne estas konata; oni ofte identigas ĝin kun la pankreaso, kiu tamen ne estas membraneca.

4) Kvin elementoj: ligno, fajro, tero, metalo kaj akvo, al kiuj respondas kvin „veraj” aŭ „noblaj” organoj: hepato, koro, lieno, pulmoj kaj renoj resp.

5) Kvin koloroj: bluo, ruĝo, flavo, blanko kaj nigro, al kiuj respondas la nomitaj kvin organoj resp.

6) Oni tiam palpis la pulson en 3 korpopartoj: supra, meza kaj mal-supra, kaj distingis ĉe tio po 3 signoj (lokoj) responde al la organoj en kapo, brusto kaj ventro.

7) Komprenoble oni tiam ne posedis ĝustan komprenon pri ili.

8) Kutima esprimo de humileco.

9) Unu el liaj ĉefaj celoj de la dissekcado estis: decidi, ĉu ambaŭ intestoj fakte ekzistas, kion li tamen - ja mirige - ne povis konstati.

10) Tie ĉi sekvas nomoj de kelkaj antikvaj libroj, kiuj pritraktas la viscerojn.

11) *Ĉô-Ĉŭkei* (Ĉang-Ĉung-Ĉing), fama medicinisto en *Kan* (Han)-Dinastio (2a kaj 3a jarcento p. K.).

12) Per tio oni volis admoni, ke oni ne povas diveni la homan staton per la observado ĉe bestoj.

13) Nomo de jaro, kiu revenas en la ĉina kalendaro en ciklo de 60 jaroj.

14) Lia ofico estis civila administrado de la urbo kaj mastrumado de la imperiestra kortego.

15) Nomata *Kaemon*, 38-jara fripono.

16) La dissekcado estis tiam kutime farata de ekzekutisto.

17) Ĉe la homo la verkinto ankaŭ ne povis distingi ambaŭ intestojn.

18) Oni tiam kredis, ke la renoj produktas spermon, kiu fluas tra la ureteroj malsupren en la spermotubojn. En transversa tranĉo de la peniso la verkinto rimarkis krom la uretro la paron de kavernecaj korpoj, kiujn li prenis por la spermotuboj.

19) Oni tiam kredis, ke la urinveziko kolektas urinon rekte de la intesto.

20) La verkinto ne volis akcepti la ekziston de la 11 visceroj (vidu piednoton 3).

21) La nombro de la vertebro estis eble kalkulita ekde la 7a kolvertebro (t. n. vertebro elstaranta).

22) Okcidentaj legantoj eble ne povos bone kompreni tiun ĉi komparon tre konvenan.

23) Per tio la verkinto kredis, ke li povis sufiĉe rifuti la anatomiajn priskribojn en la antikvaj verkoj.

24) Verko de Johann Vesling (1598-1648)? Oni tiam kutime nomis eŭropanojn barbaroj.

25) Bone konata ĉina proverbo.

26) *Kiton* (Ĉi-Tun), fama riĉulo en la antikva Ĉinujo.

27) *Joran* (Hsü-Luan), persono neevidenta.

28) Per tio oni esprimas la lokon, kie la mano de kuracisto ne povas atingi.

29) *Gjô* (Jao), fama humana imperiestro en la ĉina pratempo.

30) *Kecu* (Ĉieh), kruela tirano en la sama tempo. Oni ofte pritraktas ambaŭ personecojn en kontrasto.

31) Tiamaniere oni kutime laŭdas la regadon de *Tokugaŭa* en *Edo*-Epoko.

32) Oni pendigas la kondamniton sur krucon; 2 ekzekutistoj staras ambaŭflanke kaj trapikas lin per lanco plurfoje alterne de la akselo oblikve supren tiamaniere, ke ĝia pinto ekaperas ĉe la kontraŭa flanko de la kolo.

33) La sekigita galveziko de urso aŭ de bovo estas eĉ nun populara kuracilo kontraŭ stomakaj malsanoj.

34) Kromprofito de la ekzekutisto?

35) Muzikinstrumento el bambuo.

36) Tiun ĉi laŭaĝan diferencon la verkinto prenis por laŭseksa.

37) *Son-Ŝi-Baku* (Sun-Ssu-Miaŭ), fama kuracisto en *Tô* (Tang)-Dinastio (la 7-a jarcento p. K.).

38) La maso estis verŝajne la pankreaso, nekonata en la ĉina anatomio.

39) Li eble jam antaŭe plurfoje faris dissekcadon sen permeso.

40) Eble serio de la artikaj apofizoj, kiun la verkinto preteratentis ĉe la unua dissekcado.